N. N. 58,

# Ŝipista kanto

*tradukita de Frieder Weigold*

En maro dronas ora sun',
Spiras aromojn nokta vent'.
Arĝenta cigno flosas nun
Tra l'steloplena firmament'.
Naĝas ŝipeto tra la akva kur',
Kordojn arĉtiras la zefir'.
Amvel' briletas en velur'
Stiras sekure la sopir'.

Ĉe mi ripozu, karulin'
Sur la ondada mara um'.
Kaj dolĉa kanto lulu vin
En la arĝenta luna lum'.
Pelas karese ondojn milda vent',
Nordstela bril' en la ĉiel'.
Ja sonĝu laŭ sekura sent';
Ke gvidos mi al kuna cel'.

Balance sub la gvida firm'
Naĝas la eta ŝipo for.
Sekure en la konka ŝirm'
Kuŝas vi, perla la trezor'.
Ke mia brako daŭre ŝirmu vin,
Ke estu tiu konko ĝi!
Al vi ĝi pretas, ho princin',
For de'l stiril' en l'ondoj ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Schifferlied" de N. N. 58 en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-834-1675 (2013-02-28 17:53:47)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2010-12-28 tiun ĉi tradukon de la kanto de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio, tel. 0049-(0)89-805687), kiu mem faris la tradukon en Esperanto.*

N. N. 58,

# Schifferlied

Es löscht das Meer die Sonne aus,
Kühlendes Mondlicht ist erwacht,
Der gold'ne Adler läßt sein Haus
Müde dem Silberschwan der Nacht.
Flüsternd am Kahne glitzt der Brandung Lauf,
Leise der Wind die Saiten rührt,
Die Liebe zieht ihr Segel auf,
Sehnsucht das Ruder sicher führt.

2. Nun ruh' an meinem Herzen still,
Sicher auf schwanker Wellen Flur,
Ein Schlummerlied dir singen will
Rauschend die wogende Natur.
Küßend der Welle Nacken streift der Wind,
Liebchen, so laß die Wange mir,
Und träume, daß dein Schifflein lind
Ich durch das ganze Leben führ'.

3. Wie wiegt sich sanft der leichte Kahn,
Liebchen, mit deiner süßen Last,
Als Muschel zieht er seine Bahn,
Die einer Perle Kleinod faßt.
Ach, daß mein Arm die traute Schale war',
Die dich umschloße allezeit!
Mit meinem Ruder spielt das Meer,
Liebchen, mein Arm ist dir bereit.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 58.*

*Arg-834-1674 (2013-02-21 12:10:37)*

*Vidu la retejon `http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/esloscht.html`. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio. La muziknotoj estas indikitaj en `http://www.lieder-archiv.de/es_loesht_das_meer_die_sonne_aus-notenblatt_600035.html`. La melodion verkis Friedrich Silcher (27.06.1789 - 26.08.1860). Pri tiu vidu la retejno `http://de.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Silcher`.*